# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

***Volumo 50, Numero 3, Marto 2017***

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**

## De la Prezidanto



Karaj estimindaj membroj de la Esperanto-Federacio de NSK,

Mi volas doni specialan inviton al vi ĉeesti la venontan kunvenon de la Federacio ĉi-dimanĉe, la 2-an de aprilo, ĉe Esperanto-Domo, komencante per tagmanĝo je la 1-a ptm.

Krom ĝenerala babilado, okazos diskuto pri kiel ni povas plibonigi la publikan percepton de Esperanto, bazita sur interesa artikolo de fama esperantisto, Lu Wunsch-Rolshoven, kiun vi povas legi ĉe http://sezonoj.ru/2017/03/vidpunkto/.


Mi esperas (re)renkonti vin dimanĉe. (Parenteze, ne forgesu, ke somertempo finiĝos dimanĉomatene: viaj horloĝoj iru unu horon retroen.)

Amike,
Jonathan Cooper, Prezidanto de EFNSW

## Lingvaj Festivaloj



La 11-an de marto 2017 okazis lingva festivalo en Parramatta. Okazis prelegoj pri la germana, la bangla, la hindia, la urda, la japana, la korea kaj aliaj. Esperantisto el Indonezio Ario Bimo prelegis pri indonezia lingvo. Nia nova membro Adam Levy parolis pri la hebrea. Pri Esperanto prelegis Rainer Kurz.



Sekva lingva festivalo okazos en Canada Bay sabate la 8-an de aprilo.
Bonvenon!
Pli da informoj: http://languagefestival.org/canada_bay



Esperanto Federation of NSW

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

EFNSW: Estraranoj: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Paul Gorny (02) 9496 0395 Penny Vos (02) 6495 2922
Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic.
Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 14:00 – 16:00 *(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Lushnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |

Estraranoj: Richard Delamore, John Casey